

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

NIA PLUMO
PRISERVU LA
PACON

BALKANA
E-RENKONTIGO

E-AKTOROJ
AKTIVADAS

MEMORE AL
SIMEON PETROV

NI RECENZAS

"LINGVA ESENCO
DE ESPERANTO"


ZAMENHOF AJ
TAGOJ

EL NIA LETER-
KESTO

JARPLANOJ DE
BEA
KAJ IEK



Batalanto por paco kaj homa progreso



„Liberigo de la materialaj rimedoj, nun sen-
sence disipataj por la vetarmado, disvolvo de
neelĉerpeblaj kreaj ebloj de la homo — jen kio
povas unuigi la homojn, jen kio devas determini
la politikon de la ŝtatoj lime de la 20-a kaj 21-
jarcentoj. Por ke ĉio ĉi realiĝu, necesas haltigi
la fortojn de la militarismo, per komunaj for-
tostreĉoj deteni la mondon kontraŭ descendo en
la abismon.“

(El la Deklaro de J. V. Andropov
de la 28-a de septembro 1983)

La bulgaraj esperantistoj, la tuta bulgara
popolo, ĉiuj fidelaj adeptoj de la demokratio,
progreso kaj paco sur nia planedo kun profun-
da animdoloro eksciis pri la forpaso, la 9-an
de februaro 1984, de la ĝenerala sekretario de
CK de KPSU kaj prezidanto de la Prezidio de

Supera Soveto de USSR Jurij Vladimiroviĉ
Andropov.

Forpasis elstara aganto de la Komunista
Partio de Sovetunio kaj de la sovetaj ŝtato, de
la internacia laborista kaj komunista movado.

Lia vivo estas modelo de abnegacia servo
al la interesoj de la sovetaj ŝtato kaj popolo.

Jurij Andropov zorgis pri plialtigo de la po-
pola bonstato, pri stabiligo de la ekonomia
kaj defenda potenco de Sovetunio, pri realigo
de pacama ekstera politiko.

Kun lia nomo estas ligita la plua evoluo de
ĉiufanka kunlaborado inter la landoj de la
socialisma komunismo, laboro por stabiligo de
l'unueco de la internacia laborista kaj komu-
nista movado apoge al la batalo de la popoloj
por paco kaj sendependeco.

Konsiderinda estas la kontribuo de J. V.
Andropov al la teoria prilaboro de l'aktualaj
problemoj de nia nuntempo. En liaj paroladoj
kaj verkoj estas prezentitaj la plej karakteraj
specifaĵoj en la nuntempa evoluo de la sovetaj
socio, estas ĝuste difinitaj la nunaj kaj antaŭ-
rantaj taskoj de la partio kaj de la sovetaj ŝtato.

J. V. Andropov streĉe laboris por realigo de
la sovetaj Programo por Paco. En siaj deklaroj
kaj paroladoj lige kun la problemoj de l'ek-
stera politiko li faris fundan analizon de la
nuna internacia situacio, elstarigis la faktorojn
de internacia streĉiteco, montris la vojojn
de batalo kontraŭ la minacanta la homaron
militdangero. En tiuj dokumentoj estas eks-
ponitaj la plej gravaj iniciatoj de Sovetunio
por stabiligo de la paco kaj internacia sekureco.
La homaro memoros lian konsekvencon kaj
obstinan batalon kontraŭ la nuklea vetarmado,
por malmarmado, kaj serenigo, por paco kaj
kunlaborado inter la popoloj.

Por ĉiuj progresemaj homoj li estigis nova
personigo de la ĉiama profunde pacama poli-
tiko de Sovetunio.

Sincera amiko de la bulgara popolo, li faris
multon por plua evoluo de la sankta bulgara-
sovetaj amikeco.

La nomo de Jurij Andropov, batalanto por
paco kaj homa feliĉo, restos por ĉiam en niaj
koroj.

TELEGRAMO

Al la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj
Prospekt Kalinina 14, Moskvo, USSR

Karegaj gefratoj kaj gekamaradoj,

Akceptu la profundajn kondolencojn de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio lige kun
la forpaso de la ĝenerala sekretario de CK de KPSU kaj prezidanto de la Prezidio de la Supera So-
veto de USSR Jurij Vladimiroviĉ Andropov. La progresemaj homoj el la tuta mondo perdis unu
el la plej elstaraj batalantoj por paco kaj amikeco inter la popoloj.

En sia abnegacia batalo kontraŭ la agresemaj planoj de la usona imperiismo kaj de ĉiuj militemaj
fortoj, la bulgaraj esperantistoj ĉerpos inspiron el la saĝaj testamentoj de Jurij Vladimiroviĉ Andropov.
La paco, prudento kaj humanismo venkos malgraŭ ĉio.

CE de BEA



NIA PLUMO PRISERVU LA PACON

NIKOLA ALEKSIEV,

Honora Prezidanto de MEM

La ĵurnalista profesio estas afero tre respondeciga. Ĝi havas grandan efikon sur la konscion de la legantaro. Kompreneble, ekzistas speco de koruptitaj ĵurnalistoj, kiuj vendis sian profesion kaj agadas kontraŭ la interesoj de la homaro. Sed ne pri ili temas nun. Mi havas antaŭvide la honestajn ĵurnalistojn, kiuj defendas la rajton de la popoloj esti sendependaj, krei sian socian ordon laŭ propraj konceptoj, vivi en konsento kun ĉiuj ceteraj popoloj — grandaj aŭ malgrandaj. Se ekzistas nesolvitaj internajbaraj aŭ internaciaj problemoj — serĉi la vojon de traktado, sed ne de militado.

En la hodiaŭa mondo nia devo de TEJA¹-anoj estas tamburi alarmon kaj helpi al la esperantistaro kompreni klare kaj profunde, ke nian mondon minacas nuklea katastrofo. Nun estas la momento por informi kaj alvoki la esperantistaron agadi aktive kontraŭ la ŝvebanta danĝero.

La plej aktuala tasko tiurilate estas la malobligo de plua instalado de nukleaj raketoj en la okcidentaj NATO-ŝtatoj — FRG, Britlando, Italio, Belgio. Jam la parlamento de Danlando voĉdonis kontraŭ tiu instalado, por daŭrigo de la intertraktadoj de Usono kaj Sovetunio. Nederlando hezitas instali raketojn pro la vasta kontraŭraketa movado en la lando. Sed FRG, Britlando kaj Italio jam komencis instali kaj pretigi tiujn strategiajn nuklearmilojn por la tiel nomata „unua bato“ kontraŭ Sovetunio kaj la ŝtatoj de la Varsovia Pakto. Nature, se tiu instalado daŭros plu, neniam intertraktadoj povas havi sencon, ĉar antaŭ la fino de la traktadoj en Genevo Usono metis antaŭ finita fakto kiel la traktadojn mem, tiel ankaŭ la eŭropajn popolojn. En ĉiuj NATO-landoj okazas amasaj antimilitaj demonstracioj, tri kvaronoj de la publika opinio estas kontraŭ la instalado, por revenigo al Usono

de la jam instalitaj raketoj, por fari ebla la renovigo de la intertraktadoj en Genevo. Tion proponas la registaro de Greklando al siaj aliancanoj el NATO, tamen ili volas preni antaŭvide nek la racian voĉdonadon de la Dana parlamento, nek la proponon de Greklando, nek la postulojn de la vastaj popolamasoj en ties propraj landoj. Intertempe la mondo estis atestanto de alia krima akto — la milita interveno de Usono en la etan landon Grenado sub preteksto, ke Grenado minacas la sekurecon de Usono! Lando kun armeo de unu milo da soldatoj minacas la sekurecon de grandega lando kun kelkaj milionoj da soldatoj.

Ni TEJA-anoj posedas ne nur la kapablon verki, ni posedas ankaŭ unikan instrumenton — la Internacian Lingvon. Ĝin ni devas uzi en servo de interkomprenigo de la popoloj, kontraŭ la militpreparoj. La ideologiaj diferencoj ne devas esti kaŭzo de militoj por ekstermo de la homaro, por neniigo de la kulturo kaj civilizo. Oni devas lasi al la historia evoluo pruvi kiu socia sistemo pli bone servas al la interesoj de la popoloj, por solvo de la tuthomaraj problemoj — paca kunekzistado, kunlaborado kaj sekureco de ĉiuj popoloj kaj ŝtatoj sendepende de ilia sociordo kaj reganta ideologio.

La horizonto de la nova jaro estas kovrita de nigraj nuboj. Ni tamen estas optimistoj. Ni kredas, ke la atomaj maniuloj estos briditaj. La homaro volas militi nek per klasikaj, nek per atomaj armiloj. La homaro volas plu vivi sur la terglobo. En la nomo de l'vivo manifestacias milionoj da homoj en Nov-Jorko kaj Londono, en Romo kaj Bono, en Parizo kaj Moskvo, en Prago kaj Sofio. Nia plumo glori, subtenu la pacstrebon de la milionoj!

¹) TEJA — Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio

PER ESPERANTO — POR AMIKECO KAJ PACO SUR LA BALKANOJ

La amikaj ligoj de la bulgaraj esperantistoj kun esperantistoj el la najbaraj balkanaj landoj komenciĝis jam ĉe la unuaj paŝoj de la bulgara nacia E-organizaĵo, fondita en 1907 sub la nomo Bulgara Esperantista Ligo (BEL). Ĝian kongreson en Ruse en 1909 ĉeestis du rumanaj esperantistoj, kiuj post la finiĝo de la kongreso kondukis kelkdekojn da kongresanoj al Bukareŝto. Tien venis ankaŭ 11 serbaj esperantistoj, tial la renkontiĝo ricevis internacian karakteron kaj estis nomita unua kongreso de la esperantistoj el la apuddanubaj landoj.

La kongreson de BEL en 1910 en Sofio de nove ĉeestis ankaŭ rumanaj esperantistoj. La kongreso prenis decidon pri eldonado de komuna revuo de la bulgaraj kaj rumanaj esperantistoj sub la titolo „Danubo“. La revuo komencis aperi en 1911 kaj aperadis ĝis la mezo de 1912 sub la zorgoj de komuna redakta komitato el bulgaroj kaj rumanoj, sub la ĉefredakteco de la elstara rumana esperantisto d-ro Robin.

La periodo de la militoj (1912—1918) interrompis por kelka tempo la disvastiĝon de Esperanto sur la Balkanoj. La ideoj pri paco, amikeco kaj kunlaborado cedis lokon al la tondro de kanonoj, al la malpuraj ondoj de ŝovinismo kaj militarismo. Sur la batalkampoj pereis ankaŭ multaj esperantistoj — homoj, kiuj profunde malamis ŝovinismojn kaj militon kaj sincere laboris por amikeco inter la balkanlandaj popoloj.

Dum la postmilita periodo la esperantistoj komencis restarigi la ligojn inter si kaj krei novajn. Aparte plioftiĝis la reciprokaj vizitoj de naciaj E-kongresoj. La kongreson de la bulgaraj esperantistoj en Sofio en 1922 ĉeestis ankaŭ dek kroataj esperantistoj frunte de Dragostin Stefanković; la kongreson en Veliko Târnovo en 1923 partoprenis granda grupo da rumanaj esperantistoj, inter kiuj la konataj ing. Henriko Fiŝer, Andreo Ĉe, Tiberiu Morariu kaj ing. Balaŝ, membro de la rumana senato, kiu prelegis pri temo „La vojo al paco“; la kongreson de la rumanaj esperantistoj en la sama jaro partoprenis granda grupo da bulgaraj esperantistoj; la kongreson de bulgara gejunularo en 1924 en Pazarĝik vizitis kaj salutis ing. Fiŝer; la kongresojn de la bulgaraj esperantistoj en 1925 kaj 1926 ĉeestis rumanaj

esperantistoj, inter kiuj denove Andreo Ĉe, Fiŝer, Morariu; en 1928 la kongreson en Vraca ĉeestis rumano kaj jugoslavo. Aparte gravan laboron faris la balkanlandaj esperantistoj (bulgaroj, grekoj, jugoslavoj kaj rumanoj) enkadre de la bulgara E-kongreso en 1930 en Sofio: en speciala kunsido ili prenis la decidon pri eldono de E-revuo „Balkana Konkordo“ sub la gvido de redakta komitato el esperantistoj el Bulgario, Greklando, Jugoslavio kaj Rumanio. Tio ĉi estis bonega revuo, en kiu oni aperigis materialojn pri la problemoj de amikeco kaj kunlaboro inter la balkanlandaj esperantistoj, novaĵojn el ties vivo, ankaŭ verkojn el la literaturoj de la najbaraj landoj.

La kongreson de la bulgaraj esperantistoj en 1931 en urbo Stara Zagora ĉeestis grekaj kaj turkaj esperantistoj; la kongreson en Sofio en 1932 — rumanaj esperantistoj, inter kiuj la konataj Harabaĝiu (kiu prelegis pri temo „Internaciaj rilatoj kaj internacia mono“) kaj ing. Fiŝer, kiu prelegis pri „Enkonduko“ kaj oficialigo de novaj vortoj en Esperanto“. En 1933 grupo de 35 bulgaraj esperantistoj post la fermo de la kongreso en Ruse ekskuris al Bukareŝto, kie ili estis honoritaj per akcepto fare de la urbestro. La kongreson de la bulgaraj esperantistoj, okazinta en 1939 en Pleven, partoprenis du jugoslavoj-esperantistoj el Karlovac kaj Zagrebo. Estis prenita decido interŝanĝi po 50 ekzemplerojn de la presorganoj de BEA kaj de la Jugoslavia E-Ligo. La interŝanĝo bedaŭrinde, estis interrompita pro la invado de la germana hitlerista armeo sur la Balkanojn. Kaj en 1942 la eldonado de „Bulgara Esperantisto“ estis malpermesita de la faŝista registaro.

La milito estis grava elprovo ankaŭ por la esperantistoj. En ĉiuj balkanaj landoj ili manifestis sian malamon al la faŝistoj. Aparte aktive partoprenis la batalon kontraŭ faŝismo la bulgaraj kaj jugoslavaj esperantistoj. Ili donis multajn karajn viktimojn.

En la dua postmilita kongreso de la bulgaraj esperantistoj en 1946 en Asenovgrad partoprenis granda grupo da jugoslavaj kaj rumanaj esperantistoj. Enkadre de la kongreso okazis la unua postmilita konferenco de balkanlandaj esperantistoj. Interalie ĝi decidis, ke revuo „Internacia Kulturo“, kiu komencis aperi la antaŭan jaron, fariĝu kultura revuo

de la balkanlandaj E-asocioj kun redakta komitato el bulgaraj, jugoslavaj kaj rumanaj esperantistoj sub la ĉefredaktoreco de Asen Grigorov. Iom poste „Internacia Kulturo“ transformiĝis en revuon de la apuddanubaj landoj — Bulgario, Jugoslavio, Rumanio, Hungario kaj Aŭstrio. Ĝi aperadis ĝis 1950 kaj donis bonan kontribuon al la nobla afero de amikeco kaj kunlaboro inter esperantistoj el la balkanaj kaj apuddanubaj landoj.

En la sekva 1947 enkadre de la kongreso de jugoslavaj esperantistoj en Varaĵdin okazis la dua postmilita konferenco de balkanlandaj esperantistoj, kiun partoprenis samideanoj el Bulgario, Jugoslavio, Hungario kaj Rumanio.

Dum la postaj jaroj preskaŭ ĉiujn kongresojn de la bulgaraj esperantistoj partoprenis ankaŭ esperantistoj el la najbaraj landoj. Ankaŭ bulgaroj ĉeestis la kongresojn de siaj amikoj el la najbaraj landoj. Aparte notindaj estas la partopreno de amasaj grupoj de bulgaraj esperantistoj en la UEA-kongresoj en Beogrado (1973) kaj Ateno (1976) kaj de grandaj grupoj da balkanlandaj esperantistoj en la UEA-kongresoj en Sofio (1963) kaj en Varna (1978). Notinda estas ankaŭ la fakto, ke la artprogramojn de la Universala Kongreso en Ateno partoprenis la Bulgara E-Teatro per la komedio de Mollière „Lernejo de virinoj“ kaj la ĥoro de urbo Târgoviște per riĉa muzikprogramo. Dum la Kultura Festivalo de la la jugoslavaj esperantistoj en urbo Split la Bulgara E-Teatro prezentis la komedion de Iv. Vazov „Ĉasantoj de oficoj“.

Preskaŭ ĉiujare bulgara profesia pupteatro partoprenas la pupteatran festivalon en Zagrebo. Junaj bulgaraj esperantistoj partoprenis E-laborbrigadojn en Jugoslavio, jugoslavoj laboris en Bulgario.

Senton de sincera ĝojo kaj amikeco kaŭzis ĉe ni la amasaj gastadoj de grupoj da grekaj esperantistoj el Tesaloniko kaj Ateno en 1965 kaj 1966, same grupo da junaj esperantistoj el Svetozarevo (Jugoslavio), kiuj gastis en Sofio en la sama tempo. En 1978, invitive de Helena E-Asocio, mi havis la ĝojon pasigi ĉirkaŭ 20 tagojn en Ateno, kie mi gvidis E-kursojn. Pasintjare rumanaj esperantistoj gastis en Sofio kaj aranĝis ekspozicion.

La tuta agado de Bulgara Esperantista Aso-

cio estas saturita de spirito de sincera amikeco al ĉiuj balkanaj popoloj kaj de estimo al ties naciaj kulturoj.

Ni la bulgaraj esperantistoj opinias tamen, ke ĉio farita ĝis nun sur la kampo de kunagado de la balkanlandaj esperantistoj, estas tute nesufiĉa; ĝi estas nur komenco, montranta la vojon, laŭ kiu devas evolui estonte tiuj interrilatoj. Nun ekzistas aparte favoraj kondiĉoj por tio dank' al la politiko de bonnajbareco, kiun realigas niaj registaroj. Ni devas profiti la favorajn cirkonstancojn por krei solidan bazon de konstanta fruktodona kunlaborado.

En la agadprogramoj de niaj E-asocioj devas esti antaŭviditaj: regulaj ĉiujaraj konferencoj de la balkanlandaj esperantistoj; oficiala kaj neoficiala partopreno de esperantistoj en kongresoj, renkontiĝoj, jubileaj celebradoj, seminarioj, kursoj ka.; organizo de ekskursoj; interŝanĝo de libroj, lernolibroj kaj instruhelpiloj, de E-filmoj kaj ekspozicioj, de agadplanoj, de artistaj grupoj, prelegantoj, kursgviantoj k.a., komuna eldono de libroj, albumoj, propagandaj materialoj, jubileaj folioj; disvastigo de certa kvanto de la asociaj presorganoj en ĉiu aparta lando; aranĝo de amikaj renkontiĝoj kaj konferencoj laŭ profesioj kaj intereso ktp.

Bulgara Esperantista Asocio, kiu ĉiujare akceptas kompleksan programon por pli ol 50 regionaj naciaj kaj internaciaj aranĝoj, speciale invitas la samideanojn el la najbaraj landoj partopreni la Revuojn (festivalojn) de la E-parolo kaj Kanto, la Internacian Recitalon-Konkurson de Botev-poezio en Vraca, la Internacian Someran E-Universitaton en Veliko Târnovo; la E-kursojn, organizatajn de la Internacia E-Kursejo (en Varna ĉe la Nigra Maro — de majo ĝis oktobro kaj en sia propra E-domo en Pisanica, Rodopi-montaro apud Smoljan — tutjare kaj speciale en julio kaj aŭgusto, kiam funkcias specialaj metodikaj grupoj por E-instruistoj).

Do, per Esperanto al florado de la bonnajbareco, amikeco kaj interkompreniĝo de la balkanlandaj popoloj, al paco kaj sekureco sur la Balkanoj!

KUNĈO VÁLEV,


ĝenerala sekretario de BEA

(el lia raporto antaŭ la partoprenantoj en la Renkontiĝo de Balkanlandaj Esperantistoj)

SCHIGO DE LA BULGARA E-MUZEO

Serĉataj periodaĵoj: „Bulgara Filmo“, „Fracteco“, „Internacia Agrikultura Bulteno“, „Internacia Veterinara Revuo“, „Juna Esperantisto“ (Vraca), „Lumo“ (Veliko Târnovo), „Revuo

bulteno“ (Ruse). BULGARA ESPERANTO-MUZEO — p. k. 66, 1090 Sofio, Bulgario — proponas interŝanĝon de periodaĵoj, libroj, bibliografiaj informoj kun ĉiuj interesigantoj.



MEMORE AL SIMEON PETROV



El urbo Kârĝali venis funebra informo: forpasis **Simeon Petrov**, veterano de la bulgara E-movado, unu el la plej meritaj agantoj de la laborista E-movado kaj pli malfrue — unu el la pioniroj kaj fondintoj de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA).

Simeon Petrov kaj mi estas samurbanoj — ni naskiĝis kaj kreskis en la bela nordokcidenta balkana urbeto Berkovica. Ni lernis en la sama gimnazio, sed Simeon estis unu jaron pli aĝa ol mi. Tiutempe ni ne estis intimaj amikoj, ĉar ni lernis en diversaj klasoj kaj loĝis en diversaj kvartaloj.

Mi ne scias kiam li estiĝis esperantisto — mi neniam demandis lin pri tio. Post la frakaso de la Septembra Armita Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923 lia familio transloĝiĝis en Sofion. Nia persona proksimiĝo kaj komuna esperantista agado komenciĝis en la ĉefurbo.

Kiam kaj kie ni renkontiĝis unuafoje — mi ne povas nun rememori. Verŝajne dum kunveno de la Sofia Laborista Esperanto-Societo en la aŭtuno de 1928, kiam mi enmatrikuligis studento pri agronomio en la Sofia Universitato.

Tiutempe la societo iniciatis la eldonon de memstara laborista E-revuo nomita „Balkana Laboristo“. Simeon proponis, ke la redakto instaligu en lia loĝejo sur strato „Ŝar planina“ 56. Ĝi estis tipa unuetaĝa domo en la proleta kvartalo Konjovica.

En la ĉambro de Simeon kaj lia pli juna frato Dimitâr troviĝis dupersona lito, sed restis sufiĉe granda vaka spaco, kie estis skribtablo kaj kelkaj seĝoj. Kiam la seĝoj ne sufiĉis, kelkaj personoj povis sidiĝi sur la lito.

La redakcia laboro de Simeon estis subtenata de lia tuta familio. Eĉ lia analfabeta patrino avinjo Kata volonte plenumadis iujn taskojn lige kun la disvastigo de la revuo, gastigadis geamikojn-esperantistojn el la provinco, liveris al ili Esperantan literaturon, enkasigis abonpagojn ktp.

La redaktado de „Balkana Laboristo“ estis konfidita al mi kaj al k-do Atanas Lakov — bonega konanto de Esperanto kaj de la bulgara lingvo, sperta tradukanto de poeziaĵoj.

Administranto (tute senpaga, kiel ankaŭ la redaktoroj) estis Simeon Petrov. Lia hejma adreso estiĝis ankaŭ redakcia adreso. Ekde tiam, en daŭro de kelkaj jaroj (ĝis la eksterlegigo de BuLEA kaj ties eldonoj) la adreso „Ŝar planina“ 56 estis kvazaŭ simbolo de la laborista E-movado. Kompreneble, tiu populara adreso estis bone konata ne nur al la maldekstraj esperantistoj, sed ankaŭ al la policagentoj, kiuj konstante observadis — kaŝe aŭ duonkaŝe, niajn formale laŭleĝajn, sed ĉiam terure persekutatajn esperantistajn manifestiĝojn.

Pro amara sperto la proletaj gazetistoj ne plu anoncis sur la kovrililo de la revuoj la nomojn de la redaktoroj. La sola nomo sur la unua paĝo de „Balkana Laboristo“ estis tiu de la administranto. La polica cenzuro ordonis konfiskon de iu numero de „Balkana Laboristo“ kaj iniciatis proceson laŭ la Leĝo por Defendo de la Stato. La administranto Simeon Petrov estis arestita.

Tiu bonega kamarado estis ĵetita en la cementajn ĉelojn de la Sofia Centra Malliberejo. Li restis kelkajn monatojn en la krudaj kondiĉoj de la malliberejo. Nur post la praviga verdikto li estis liberigita. Sed neniu ŝtata organo postulis respondecon de la faŝistaj cenzuristoj pro tiu malkaŝa arbitraĵo kontraŭ laborista revuo kaj ties administranto.

Simeon Petrov estis la unua el la kunlaborantoj de „Balkana Laboristo“, kiu estiĝis viktimo de la faŝista cenzuro. La unua, sed bedaŭrinde ne la lasta. . .

Nature, ankaŭ post la enkarcerigo Simeon Petrov restis la sama firma antifaŝisto. Li senlace zorgis pri la disvastigo de „Balkana Laboristo“ kaj de la ceteraj postaj eldonaĵoj de BuLEA, pri regula kolektado de la abonpagoj, pri enkasigo de sumoj ricevataj de manvendado de la eldonaĵoj, senlace korespondis kun kamaradoj el la provinco kaj insistis antaŭ ili pri tuja elŝuldiĝo. Nur tiamaniere estis eble garantiĝi la necesan materialan bazon por daŭrigi nian eldonagadon.

Li bonege posedis Esperanton. Tio helpis al li kunlabori al la Esperanta gazetaro sub diversaj pseŭdonimoj (laŭ la tiama praktiko).

* * *

Malgraŭ la krudaj laborkondiĉoj sub la fa-

ŝismo Simeon Petrov kutime estis en bona humoro. Eĉ en plej amaraj situacioj li ŝercis kaj ridetis. La bonhumoro estis esenca trajto de lia karaktero. Lia profunda optimismo helpis al li elteni la persekutojn de la polico. Liaj malmultaj hazarde konservitaj leteroj elokvente parolas pri lia humursento. Krome, li estis belulo kaj ege simpatia persono.

Li estis ne nur esperantista veterano, sed ankaŭ estimata urbano de Kârĝali. Tie li redaktis lokan gazeton, plenumis amason da sociaj taskoj starigitaj de la Distrikta Komitato de BKP.

Lia nomo por ĉiam restos en la historio de la bulgara E-movado.

NIKOLA BOGDANOV
esperantista veterano

SOVETIA AMIKO DE BULGARAJ BATALANTOJ POR LIBERO

Celebrante la heroojn de la Septembra Ribelo de 1923, ni danke rememoras pri tiuj, kiuj organizis kaj gvidis en Sovetunio la kampanjon de solidareco kun la bulgaraj batalantoj por libero. Inter ili estas ankaŭ la nomo de la bonega filo de la latvia laborista klaso Pjotr Bertuloviĉ Jurevskij — veterano de la batalo por soveta regpotenco, unu el la organizintoj de la kazaĥa Soveta Socialisma Respubliko, de la Kazaĥa Komunista Partio kaj la Sindikatoj de Kazaĥio (Kazaĥstano).

Multaj dokumentoj, trovitaj en la arkivoj, kaj ankaŭ rememoroj de kamaradoj kaj kunbatalantoj de Jurevskij parolas pri lia aktiva partopreno en la organizado de amasa kampanjo en Soveta Kazaĥstano por doni moralan kaj materialan helpon al la batalantoj de la Septembra Ribelo, al la viktimoj de la faŝismo en Bulgario.

Riĉa kaj tre interesa estas la biografio de tiu veterano de la Bolŝevista Partio de Sovetunio. Nur 16-jara, li fariĝis membro de la partio en 1912 kaj aktive partoprenis la batalon kontraŭ la kapitalismo kaj la rusa carismo. En 1918 Jurevskij fariĝis unu el la komisaroj de Latvio. Dum la sekvaj jaroj de la civitana milito la partio lin sendis al Kazaĥstano kaj tie li fariĝis unu el la gvidantoj de la batalo kontraŭ la blankaj bandaĉoj kaj la kazaĥaj burĝaj naciistoj. Post la plena venko super la blankuloj, la partio donis al Jurevskij la taskon labori sur la sindikata kampo. Li estis elektita prezidanto de la gvida komitato de l'kazaĥa sindikata movado. Guste de tiu gvida posteno Jurevskij faris multon por helpi la bulgarajn revoluciulojn. La sindikatoj de

Kazaĥio estis inter la unuaj, kiuj jam en 1922 esprimis solidarecon kun la strikantaj tabaklaboristoj en Bulgario. Laŭ propono de Pjotr Jurevskij la komunistoj el la nutraĵindustrio en Orenburg decidis doni 10% el siaj salajroj por helpi materiale la strikantojn en Bulgario. Ilia ekzemplo estis sekvita vaste de laboristoj kaj kamparanoj de Kazaĥstano. En 1922 nur en la kazaĥa ĉefurbo oni kolektis kaj sendis al Bulgario sumon de pli ol 83 000 rubloj.

La sciigo pri frakaso de la Septembra Ribelo en Bulgario provokis ĉe la kazaĥa popolo, samkiel ĉe ĉiuj popoloj de la soveta lando, doloron kaj maltrankviliĝon. Pjotr Jurevskij multfoje veturis al proksimaj kaj malproksimaj aŭloj (vilaĝetoj), parolis en kunvenoj pri la peza stato de la bulgaraj revoluciuloj, pri la furiozado de la bulgara faŝismo, pri la viktimoj de ties teroro. Responde al lia alvoko malriĉuloj kaj dungitaj laboristoj en multaj kazaĥaj vilaĝoj fordonis siajn dombestojn (ĉevalojn, bovinojn, ŝafojn) por la fonduso por helpo al la bulgaraj kontraŭfaŝistoj. Tiujn bestojn oni vendis kaj la ricevitajn monojn sendis al la suferantaj bulgaraj fratoj.

Samtempe komenciĝis korespondado inter soveta kaj bulgaraj civitanoj en la lingvo Esperanto. Kune kun Konstantin Koblev, Pjotr Jurevskij instigis kaj mem organizadis studrondojn de Esperanto en oficejoj, entreprenoj kaj organizaĵoj en kelkaj urboj de gubernio Akmolinsk. En tiuj studrondoj oni tradukis en Esperanton leterojn, ankaŭ rezoluciojn, akceptitajn en kunvenoj kaj mitingoj, adresitajn al la bulgaraj batalantoj.

„Post la Septembra Ribelo en 1923 mi ple-

numis partian kaj sindikatan laboron — ĉu leĝe, ĉu eksterleĝe — skribis poste en siaj rememoroj la konata bulgara partia kaj sindikata aganto Jordan Milev (li mortis pasintjare en aĝo de pli ol 100 jaroj!) — Mi rememoras, ke gubernio Akmolinsk en Kazaĥistano donis gravan helpon al la bulgaraj revoluciuloj, partoprenintaj la Septembran Ribelon. Ekde la mezo de la tridekaj jaroj mi estis politika malliberulo en kelkaj prizonoj. . . Min kaj miajn fratojn laŭ klaso — komunistojn kaj sindikatagantojn — savis la senpera helpo de la sovetaj fratoj. Tre malfacile niaj liberaj kamaradoj (tiuj, kiuj restis eksterprizone) transdonis al ni monon kaj sendaĵojn. El Sovetunio, inkluzive el Kazaĥistano, alvenadis leteroj al la preslaboristo Todor Danailov, al la fervojisto Nikola Penev, al la sofia advokato Ivan Pašov k. a. Tiujn ĉi leterojn ili multobligis ĉu mane, ĉu tajpe. . . “

En la organizado de la sendo de tiaj leteroj aktive partoprenis ankaŭ Pjotr Jurevskij.

En 1940 P. Jurevskij fariĝis profesoro de politika ekonomio en superaj lernejoj de Moskvo.

Arda propagandanto de la sovet-bulgara amikeco, li sincere salutis la popoldemokratian revolucion en Bulgario je la 9-a de septembro 1944 kaj la konstruadon de socialismo en Bulgario. En lekcioj kaj kunvenoj antaŭ studentoj kaj civitanoj li multfoje parolis pri la Septembra Ribelo de 1923, rakontis pri la laboro helpe al la bulgaraj revoluciuloj. Aparte li substrekadis la signifon kaj la rolon de la unueco, al kiu praktike, el propra sperto, venis la bulgaraj laboristoj, kamparanoj kaj progresemaj intelektuloj, rakontadis pri ilia senkompromisa kaj kuraĝa batalo kontraŭ la faŝismo, por la triumfo de la senmortaj ideoj de marksismo-leninismo.

JOSIF PORTNOJ,
kandidato de la historiaj sciencoj,
Karaganda (Kazaĥa SSR)

DU AŬTOGRAFOJ

Mia bulgara korespondamiko Nikola Dolĉinkov sendis al mi la E-libron „Mia vivo“ de Trifon Hristovski. Mi rakontis pri ĝi al konataj al mi blindaj esperantistoj kaj ili petis min surbendigi la tekston de la libro.

Plenumante la peton mi vivis kelkajn semajnojn kun la nobla kaj abnegacia vivo de Tr. Hristovski. Lia batalo kontraŭ la vivobstakloj povas esti modelo ne nur por blinduloj, sed ankaŭ por ĉiuj homoj, kiujn ne drolotis la sorto.

Kiam en 1982 Leningradon vizitis Nikola Aleksiev, tradukinto de „Mia vivo“, mi lin petis meti sian aŭtografon sur mian libron. Do, sur unu librofolio apudas du aŭtografoj: tiu de la bulgara kamparano Nikola Dolĉinkov kaj de la honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev. Ili rememorigas min pri la eksterordinaraj kaj dignaj sortoj de Tr. Hristovski, de miaj blindaj geamikoj kaj de N. Aleksiev.

M. ABOLSKAJA (USSR)

25-JARA ARTISTA E-AGADO



Sceno el la teatraĵo „Malnovmoda komedio“ de A. Arbuzov. Roluloj — Belka Beleva kaj Anani Anev.

La 6-an de decembro 1983 la sofiaj esperantistoj partoprenis unikan feston omaĝe al la 25-jara artista agado de Belka Beleva kaj Anani Anev sur Esperanta scenejo. La solena celebrego okazis en la Domo de Soveta Scienco kaj Kulturo. Antaŭ plenplena salono la amataj geaktoroj brile prezentis „Malnovmoda Komedio“ de A. Arbuzov, sub la reĝisorado de Nikola Petkov. Ilia ludo estis bonega kaj ilia sceneja Esperanto — preskaŭ senripoĉa. Ili tre klare prononcas la frazojn, la vortojn, la vortfinaĵojn. Oni ne bezonas senĉese streĉi la orelon kaj la atenton. . . Oni preskaŭ forgesas — nature, ĉe bona posedo de Esperanto — ke la replikoj sonas ne en la gepatra lingvo. Tio estas tre granda sukceso — persona sukceso de la geaktoroj Beleva kaj Anev kaj sukceso de la Esperanta teatro ĝenerale.

Post la spektaklo la ĝenerala sekretario de BEA Kunĉo Vălev parolis kun granda estimo kaj alta pritakso pri la vivovojo kaj agado de Beleva kaj Anev, substrekante aparte ilian E-aktivecon. Li emfazis, ke ili estas unuj el la iniciatintoj kaj fondintoj de Bulgara Esperanto-Teatro (BET), kiu unuafoje aperis antaŭ la sofia E-publiko en majo 1958. Multaj el la unua verda aktora taĉmento ne plu aktivadas en la vicoj de la esperantistoj, sed Beleva kaj Anev ekamis profunde Esperanton kaj la E-movadon, dediĉis al ili sian energion kaj talenton, fariĝis ĝiaj sindonaj aktivuloj. La kreaĵoj de tiu geedza aktora paro sur la verda scenejo markas spektaklojn enkadre

de 12 UEA-kongresoj, de 3 TEJO-kongresoj, de 3 kongresoj de la Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj (IFEF), de 7 kongresoj de bulgaraj esperantistoj kaj sennombraj partoprenoj en artprogramoj de E-konferencoj, renkontiĝoj, jubileaj kunvenoj, ĉelebroj ktp ĉe ni kaj en eksterlando.

25 jarojn sur la Esperanta scenejo! Tio vere estas unikaĵo ne nur en la historio de la bulgara, sed ankaŭ de la tutmonda E-movado. Belka Beleva kaj Anani Anev atingis siaspecan rekordon. Kaj ili merite fariĝis doĵenoj de la E-artistaro kaj favoratoj de la bulgara kaj internacia E-publiko. Pro tio rajtas fieri kaj ili, kaj la tuta bulgara E-movado.

Salutadreson al la karaj jubileuloj legis la prezidanto de BEA k-do Hristo Gorov. Li dekoris ilin per la Ora Insigno de BEA.

Al la salutparoloj respondis Belka Beleva. Kaj la publiko esprimis sian amon al la ŝatataj geaktoroj per amasego da belaj floroj.

K. V.

SPEKTAKLO DE „DEKDUJA NOKTO“

La 12-an de decembro pasintjare sur la scenejo de la Junulara Teatro „L. Jivkova“ en Sofio estis prezentita la esperanta versio de „Epifanio“ („Dekdua nokto“) de Sekspiro, per kiu la Bulgara Esperanto-Teatro (BET) sukcese sin prezentis ĉi-somere en Budapeŝto, en la kultura programo de la 68-a kongreso de UEA, kaj tiel notis sian 25-jaran jubileon.

La traduko de „Epifanio“, laŭ peto de BET, estis farita de la fama E-poeto kaj tradukisto William Auld, kiu, akceptante tiun taskon, skribis: „Labori por vivanta teatro estas vera plezuro.“ Cetere, post „Komedio de eraroj“, tio estas dua traduko de s-ro Auld por BET.

Ĉar la aŭtorino de tiuj linioj ne estas specialisto pri teatroarto kaj pri ŝekspirologio, ŝi preferas ĉi-loke doni la parolon al prof. H. Tonkin el Usono, vera spertulo pri la supre menciitaj problemoj. Jen kion li skribas interalie en artikolo titolita „Tre sukcesa prezento de malfacila verko („Esperanto“, n-ro 934(10) de 1983, sur p. 170): „En Esperanto jam ekzistas tuta tradicio de Ŝekspir-tradukoj, al kiu William Auld ja estas aktuala kontribuanto. (...) La surscenigo de *Epifanio* en Budapeŝto prezentis bonan okazon por elprovi la praktikan kvaliton de tiu ĉi traduko de Auld, (...) kiu lerte konservis la abundajn vortludojn kaj rapidajn intertraktojn de la originalo, kaj ili montriĝis plene taŭgaj por la scenejo. La realigo flanke de Bulgara Esperanto-Teatro — kiu ĵus festis sian 25-jaran

jubileon — bone respondis al la vervo kaj elano entenataj en la originalo kaj ties traduko, kaj la tuta prezento antaŭeniris kun admirinda impeto.

Sofia Karakaŝeva, reĝisorino de la prezento, bonege sukcesis pri la reĝisorado. (...) La rolojn de Viola kaj Sebastiano ludis — kun granda talento, la bela kaj altstatura Diana Najdenova. (...) Elstaris Georgi Kiŝkilov, kiu prezentis imponan Sir Tobi, kaj Valentin Ganev, kies rafinita kaj dekadenca prezento de la pajako brile kaj originale kontribuis al la tuto. Petăr Vasilev talente plenumis la etan rolon de Fabiano, kaj Svetla Dobrinoviĉ ludis nekutime kredeblan Olivia. Rumjana Gajtangieva, en la rolo de Maria, fizike perfekte redonis la esencon de la ŝekspira intenco, eĉ se ŝia papilia ludado iom malemfazis la inteligentecon de tiu rolo.

Se oni povas nomi tiun ĉi prezenton tre sukcesa klopodo pri malfacile realigebla verko, kaj se BET kaj ĝia ĉefgvidanto Kiril Draĵev meritas grandajn laŭdojn pro sia atingo, oni ne povas ne bedaŭri, ke al la elparolo de la bulgaraj aktoroj mankis tiu klareco, kiu nepre necesas por subtila ŝekspira teksto.

Antaŭ ol prezenti la spektaklon sur sofia scenejo, reĝisoro kaj aktoroj faris iujn plibonigojn, respondante al la kritikaj notoj, direktitaj al ili fare de specialistoj.

Al la gvidanto de BET Kiril Draĵev estis prezentitaj gratuletoj — en la nomo de la Asocio de Artistoj en Bulgario (subskribita de ties prezidanto Ljubomir Kabakĉiev) kaj en la nomo de Stata Oficejo „Teatroj“.

L. RAEVA



Sceno el la teatraĵo „Epifanio“ („Dekdua Nokto“) de Shakespeare, prezentita de BET sur la scenejo de la Junulara Teatro „Ljudmila Jivkova“ en Sofio.

D-ro Imre Pethes gratulas Asen Grigorov

Leginte en n-ro 6/83 de „Bulgara Esperantisto“, ke nia altestimata samideano ASEN GRIGOROV solenas la 80-jaran jubileon de lia naskiĝo, d-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM, por gratuli lin, sendis al li leteron.

La originalon de tiu letero ni transdonis al la jubileulo. Kvankam sufiĉe malfrue (pro la kondiĉoj altruditaj al ni de la presejo), ni ebligas ankaŭ al niaj legantoj konatigi kun ĝia enhavo. Jen ĝi estas:

Altestimata samideano Grigorov!

Eksciinte, ke vi solenas la 80-jaran datrevenon de via naskiĝo, en la nomo de MEM, elkore mi salutas vin kaj mi deziras, ke vi restu inter ni dum multaj jaroj, havu bonan sanon, restu verk-kapabla kaj donacu al la esperantistaro novajn versaĵojn pri paco kaj amikeco inter la popoloj!

Vere: „GARDU LA PACON!“


Mi mem, kiu lernis multon ankaŭ el via vivo, ankaŭ el viaj verkoj, sincere salutas vin kaj deziras al vi sufiĉan forton por lernigi nin.

Vivu en honoro kaj havu sanon!

Budapeŝto, 2. 10. 1983

*Kun alta estimo,
via d-ro IMRE PETHES,
prezidanto de MEM*

FORGEJO DE LITERATURISTOJ



Fine de la pasinta jaro en Sofio oni solene notis la 20-jaran aktivadon de la Literatura Rondo, gvidata de nia estimata veterano ASEN GRIGOROV. Lige kun tio reprezentanto de la redakcio petis de li intervjuon.

— Kiel vi venis al la ideo pri Literatura Rondo? Kiam ĝi fondiĝis kaj kiuj estis ĝiaj unuaj membroj? Ĉu via unua ideo ne estis prepari tradukistojn?

— La ideo pri Literatura Esperanto-Rondo

estis jam longe ĉe mi matura. Mi imagis tian rondon necesa forgejo de kadroj de nia literaturo. Ĝi tamen prenis konkretan formon, kiam iun junian tagon antaŭ 20 jaroj min vizitis junulo el Norda Bulgario, studentkandidato de bulgara lingvo kaj literaturo, kiu proponis al mi gvidi studentan literaturan rondon en la Sofia Universitato. Tiu studento estas Venelin Mitev, E-poeto, elstara ĵurnalisto, multjara reprezentanto de Bulgara Telegrafa Agentejo en Sovet-Unio kaj gvidanto, de la Pariza punkto de tiu agentejo.

La rondo formiĝis el pluraj studentoj en la Sofiaj Altlernejoj — Cvetan Cvetkov, Nikola Uzunov, Delka Colakova k.a. En la unua tempo nia rondo estis pure studenta. Kun la pasado de la tempo tamen, la finintoj de la Universitato disiris al la provinco, ĉiu al sia naskiĝloko, kaj ni daŭrigis nian aktivadon kun grandaĵuloj. Pro la nealiĝo de novaj membroj el la junaj generacioj nun la rondo konsistas plejparte el grandaĵuloj, kaj se tiel iras la aferoj, nur post kelkaj jaroj ĝi ĉesos ekzisti.

Respondante al via demando: mi konsideras la tradukadon same tiel valora kaj necesa literatura agado kiel la originalan verkadon. En certa periodo de nia funkciado ni okupiĝis pri problemoj de tradukado de belarta literaturo en Esperanton.

— *Cu en la Literatura Rondo elkreskis vere talentaj kreantoj? Cu vi povas mencii nomojn?*

— La faktoj montras, ke nia laboro estas rezultodona. Ĉe ni laboras kaj formiĝas pli-malpli bonaj poetoj, rakontistoj, eseistoj. Mi mencias la nomojn de Rajna Konstantinova, Lju-

ba Bojaĝieva, Stefan Sokolov, Todor Soŝev, Mihail Sekergiev, Violin Oljanov, Nevena Nedelčeva, Penka Batoeva, Mihail Cobanov k. a. La plejmulto el ili gajnis altajn premiojn ĉe renomataj internaciaj literaturaj konkursoj.

— *Kiel via rondo laboras?*

— Ĉiu aŭtoro prezentas sian manuskripton — rakonto, novelo, versaĵo, poemo, eseo k.t.p. La sekretario de la rondo Stefan Sokolov ĝin donas por multobligado en 20 ekzempleroj, tiel ke ĉiu rondano ricevas kelkajn tagojn antaŭ la kunveno kopion de la verko kaj anticipe preparas siajn kritikajn notojn. La aŭtoro, kies ĉeesto estas nepre necesa, notas la eldirojn kaj laŭ sia pritakso akceptas tiujn el ili, kiujn li opinias konvenaj. Li rajtas doni

definitivan formon al la materialo kaj prezenti ĝin por publikigo.

Ni kunvenas ĉiun duan semajnon en fiksita tago. La kunvenoj estas publikaj, ili estas ĉeestebaj de ĉiu esperantisto, kiu montras intereson al nia laboro.

— *Mi scias, ke estas eldonota libro kun verkoj de la rondanoj. Ĉu vi povas informi la legantojn de „Bulgara Esperantisto“ pri ĝia sorto? Kiam ĝi aperos? Kiuj aŭtoroj estos reprezentitaj en ĝi?*

— La libro, pri kiu vi interesiĝas, estas de longe prespreta. Ĝi aperos en Hungario sub la titolo „Literatura Almanako „Rila 1“. Partoprenas ĝin 28 rondanoj kaj ne-rondanoj el Sofio kaj el la provinco. Ni esperu, ke en 1984 ĝi estos en la manoj de la leganta publiko.

El nia leterkesto

IMPRESOJ DE SOVETIANOJ

„NI TROVIS MULTAJN AMIKOJN“

„Eterna amikeco!“ — jen la vortoj, kiujn oni plenrajte povus nomi gvidmotivo de la renkontiĝo de gejunuloj el nia urbo kun la gastinta antaŭ nelonge en Samarkando delegitaro de Bulgara Esperantista Asocio. La renkontiĝoj finiĝis per koncertoj de bulgaraj esperantistoj-artistoj.

En ilia programo estis kantoj kaj versaĵoj de bulgaraj aŭtoroj kaj ankaŭ verkoj de Schubert, Mozart, Ĉajkovskij, Raĥmaninov kaj aliaj komponistoj. La neordinareco de tiuj koncertoj estis en tio, ke la pliparto de eroj — muzikaj kaj deklamaj, estis plenumitaj en la internacia lingvo Esperanto. Kaj tio ebligis al la publiko laŭmerite pritaksi ne nur la brilan majstrecon de la plenumantoj, sed ankaŭ alian, por multaj homoj neatenditan aspekton de la Internacia Lingvo, evidente kapabla plenumi ne nur komunikajn funkciojn, sed esti ankaŭ lingvo de arto, enkonduki nin en la mondon de belegaj bildoj kaj impresoj.

Apartan sukceson havis Maria Angelova, solistino ĉe la Stata Koncerta Direkcio. La spektantoj alte taksis la molan, animkaptan tembron de ŝia voĉo, ŝian kapablon transdoni eĉ la plej subtilajn nuancojn de sentoj kaj la variecon de ŝia repertuaro.

La publiko vigle aplaudis ankaŭ la dramaktorinon Angelina Sotirova, kiu tre kortuŝe plenumis la poemon „Odo pri Sovetunio“ de la bulgara poeto Orlin Orlinov.

Antaŭ la forveturo la gvidanto de la delegitaro kaj ĝenerala sekretario de BEA Kunĉo Válev, laŭ nia peto, donis intervjuon por ga-

zeto „Leninskij Putj“. Al la demando: „Kion vi dirus pri via nuna veturado en nia lando?“ li respondis jene: „Kun aparta ĝojo ni alvenis en vian belegan urbon — por ni ĉiuj tio estis la unua konatiĝo kun Samarkand. Tie ĉi ni vidis belegajn monumentojn de la mezepoka arkitekturo, kreitaĵojn de la popola genio, konatiĝis kun la brilaj trajtoj de la nuna tago. Kaj kio estas plej grava — en Samarkand ni trovis multajn novajn amikojn. Ni esprimas nian sinceran dankon pro la varma, elkora akcepto!“

A. IONESOV

(el artikolo publikigita en la samarkanda gazeto „Leninskij Putj“)



Gaste al sovetiaj esperantistoj en Samarkando

MALFERMITA DANKLETERO

Ni krasnodaraj esperantistoj travivis ĝojajn horojn dum vizito de niaj sofiaj samideanoj okaze de la sesdeka datreveno de la unua kontraŭfaŝisma Septembra Ribelo.

Niaj karaj amikoj estis: la geedzoj Vălev, la kantistinoj S. Kalimenova kaj M. Angelova kaj la deklamantino A. Sotirova. Ĉi tiu vizito sendube lasis profundan spuron en niaj dankemaj koroj. Mi, ekzemple (D. T.) havis la feliĉon renkontiĝi kun mia multestimata instruisto el IEK K. Vălev, dum mi nur revis almenaŭ konstante korespondi kun li, ĉar liaj recenzoj, konsilaj leteroj kaj rimarkoj estas veraj perfektigantaj lerniloj.

Longe regos niajn korojn la neforgeseblaj impresoj ricevitaj dum la Vespero de Internacia Amikeco, organizita honore al niaj amindaj gastoj.

La prelego de K. Vălev pri la Septembra Ribelo estis alloga, pasia monologo de lerta rakontisto; temis pri vivaj historiaj paĝoj, pri

la heroaj bulgaraj ribelintoj, pri la fontoj de l'amikeco inter niaj frataj popoloj.

Kaj kiel ĉarme belsonas la internacia lingvo el la buŝo de profesiaj, talentaj artistoj! La kantistinoj S. Kalimenova kaj M. Angelova per sia plenumo de klasikaj, heroaj, dramecaj kaj ŝercaj popolaj verkoj kvazaŭ malfermis novan spiritan mondon saturitan de mirinda beleco, senlima bonkoreco.

La verva deklamo, la klare esprimita belarta vorto de talenta A. Sotirova ekposedis la atenton eĉ de tiuj, kies E-konoj estas sufiĉe etaj. . .

Do ni deziras el la tuta animo por via laboro multe da sukceso.

Permesu al ni profiti la okazon por refoje kore danki niajn gastojn. Ni ne povas ankaŭ sin deteni transdoni al niaj ĝemelurbaj samideanoj el Burgas elkorajn bondezirojn pri sukcesoj, bonfarto kaj eterna paca printempo.

G. KUDRJA, pentristo
D. TENENBAUM, ingeniero
urbo Krasnodar, USSR

Seminario de junaj E-aktivuloj

Por plivigli la aktivadon de la junaj esperantistoj en nia lando kaj por informi ilin pri la plej novaj atingoj de TEJO kaj pri la antaŭstarantaj taskoj de la monda E-junularo, la gvidantaro de Bulgara Esperantista Junularo (BEJ) organizis la 8-an — 10-an de decembro pasintjare en IEK — Pisanica, Seminarion de Junaj E-Aktivuloj.

La seminarion partoprenis ĉirkaŭ 30 gejunuloj el diversaj partoj de la lando. Plej multnombra estis la grupo de gimnazianoj el urbo Lom gvidata de ing. Todorov. Fakte tiu ĉi grupo estas ankaŭ amatora trupo por engaĝitaj kantoj kaj poeziaĵoj, kiu sin preparas partopreni la ĉi-jaran Nacian Revuon de Esperanto-Kanto kaj Parolo.

Dum tri tagoj ĉiumatene la partoprenantoj aŭskultis prelegojn pri diversaj temoj, kiuj provokis viglan intereson kaj diskutojn.

La prezidantino de BEJ Steliana Dimitrova detale informis pri la 39-a Internacia Kongreso de TEJO en Debrecen, Hungario, pasintjare, komentinte preskaŭ ĉiun ĝian programon. Kaj la informo, kaj la konciza skizo pri la agado de TEJO, kiujn faris St. Dimitrova, provokis multajn demandojn fare de la partoprenantoj. Tiu ĉi interesiĝo ankoraŭfoje pruvis la akre sentatan bezonon de regula kaj pli riĉa informado pri la diversflanka agado de TEJO.

En siaj altnivela prelegoj la estraranoj de BEJ Dimităr Petrov kaj Mariana Elenova parolis pri la partopreno de junaj bulgaraj esperantistoj en la batalo kontraŭ faŝismo kaj

kapitalismo en Bulgario kaj pri la aktivado de la Bulgara Sekcio de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM).

La ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Dončo Hitrov, kiu estis gasto de la seminario, faris ampleksan informon pri la 68-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto kaj speciale substreki la viglan aktivadon de bulgaraj geesperantistoj en diversaj kunvenoj kaj aranĝoj.

En sia prelego „Pri planlingvoj ĝenerale kaj pri Esperanto aparte“ li tuŝis interesajn problemojn lige kun la multnombraj provoj pri kreo de internacia planlingvo dum la jarcentoj, parolis pri la avantaĝoj de Esperanto kaj pri la personeco de ties fondinto d-ro L. L. Zamenhof. La preleganto substreki la gravecon de serioza kaj persista lernado de Esperanto fare de junaj E-aktivuloj, kiuj devas esti imitinda modelo por la ceteraj geesperantistoj.

La prelegoj estis vigle diskutitaj fare de la partoprenantoj.

La seminario feliĉe koincidis kun la tradicia Festo de Studentoj, kiun la partoprenantoj ĝoje festis kune kun la feriantaj en IEK gestudentoj el diversaj bulgaraj altlernejoj.

Laŭ propono de la partoprenantoj estis decidite, ke estonte BEJ organizu regulajn seminariojn kaj renkontiĝojn de junaj E-aktivuloj, kio certe kontribuos por plivigli kaj plibonigi de ilia aktivado.

MARIA NIKOLOVA

HEROAJ EPIZODOJ

Maria T. Jankova-Bojagieva. LA BULGARA REVOLUCIA ESPERANTA GAZETARO DUM LA PERIODO 1929—1934. Tradukis Lidia Raeva. 1983, 78 paĝoj.

Nuntempe nia Asocio okupas elstarajn poziciojn en la internacia E-movado, kio sendube estas merito de la antaŭmilita generacio. En sia verko la aŭtorino pritraktas meritoplenajn redaktorojn kaj eldonistojn de „Balkana Laboristo“, „Internacia Lingvo kaj „Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“, aperantaj antaŭ duonjarcento en Sofio. Jankova havis la bonan intencon rakonti nome pri la iniciatintoj de Laborista Esperanto-Asocio (LEA).

Ciam oni komencas per io malgranda — tio venis al mi en la kapon, rememorante la modestan revueton „Balkana Laboristo“, kiu komencis aperi ĝuste antaŭ 55 jaroj. Tiam en nia lando regis la faŝista reĝimo, sed malgraŭ tio la celoj de la gazeto estis liveri al la proletaj esperantistoj tribunon, kolekti ĉirkaŭ si la progresemajn esperantistojn. La historio pruvigis, ke „Balkana Laboristo“ plene sukcesis, rolante kiel kolektiva propagandanto kaj organizanto. Ĝia enhavo portis en si la ĝermojn de vera revoluciismo en la enlanda Esperanto-movado. Dank’ al „Balkana Laboristo“ en 1930 oni metis la fundamenton de LEA kiel sekcio de la internacia proleta E-movado. Al LEA aliĝis ĉefe ĝejnuloj, kiel ankaŭ junaj estis la iniciatintoj mem. Legante iliajn verkojn — artikolojn, versaĵojn, beletraĵojn kaj tradukaĵojn, oni konstatas, ke tiutempe la redaktoroj, aŭtoroj kaj eldonistoj estis junaj homoj 20—25-jaraj, sed ili verkis maturajn verkojn, kiuj lasis postsignojn en la historio de la enlanda Esperanto-movado.

Kiam ekpulis la koro de LEA, ĝiaj gvidantoj metis antaŭ si la taskon propagandi Esperanton en la medio de la laborista klaso, servi per Esperanto al la proletaro. Tiucele LEA eldonis bulgarlingve la gazeton „Internacia Lingvo“ kaj „Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“. La movado progresis en la laboristaj medioj en urboj kaj urbetoj — Sofio, Plovdiv, Varna, Stara Zagora, Asenovgrad, Kjustendil, Sumen k.a. Precipe ŝatata estis la ilustrita „Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“, ĉar en ĉiu numero oni publikigis leterojn kaj korespondaĵojn el USSR. Sovetaj esperantistoj estis la ĉefaj kunlaboran-

toj, sed estis ankaŭ multaj korespondantoj el Japanio, Aŭstralio, Britio, Francio, Ĉinio. La gazeto fakte estis tribuno de la internaciaj korespondantoj. Ĝia moto „Proletoj el ĉiuj landoj, unuigu!“ montris al la legantoj, ke ĝi agitas por socia renverso, por socialisma sociordo. Tio pravas, ke al tiuj junaj redaktoroj kaj eldonistoj ne mankis kuraĝo kaj memfido. Sentime ili ekstaris antaŭ cenzuristoj, policestroj, prokuroroj kaj juĝistoj, defendis siajn ideojn. Mi rememoras — foje, certe en 1933, mi akompanis k-don N. Aleksiev al la prokurorejo. La severa oficisto minacis Aleksiev per aresto, ĉar li publikigis broŝuron, en kiu li pledis por liberigo de Georgi Dimitrov kaj liaj kamaradoj Tanev kaj Popov. Al la minacoj Aleksiev firme respondis, ke Dimitrov estas bulgara civitano, eksdeputito kaj ekssekretario de la bulgaraj profunuigoj kaj devo de ĉiuj bulgaraj patriotoj estas defendi lin kaj postuli lian liberigon.

Simile al Aleksiev kondukis ĉiuj redaktoroj de la eldonado de LEA. Ili preferis malliberigon ol malfidelecon al siaj idealoj.

Per sia verko Jankova faras bonan servon al la bulgara E-movado. Ŝi memorigas al ni la glorajn tagojn de LEA, substrekas la meritojn de la veteranoj, kiuj tiom senlace kaj sinofere laboris por klaskonsciigo de la bulgaraj esperantistoj. La juna generacio ĉerpos informojn kaj inspiron el tiuj heroaj epizodoj de nia landa Esperanto-movado.

La traduko, farita de Lidia Raeva, estas en bela Zamenhofs stilo. Ni varme rekomendas la verkon al niaj legantoj.

ĤRISTO ISKROV

„LINGVA ESENCO DE ESPERANTO“ DE ADA

Por evoluigo kaj riĉigo de la Internacia Lingvo kontribuis pli ol 100 E-akademianoj kaj ankaŭ aliaj esperantistoj. Iliaj verkoj aperadas jam dum 90 jaroj sur la paĝoj de centoj da periodaĵoj en multaj landoj. Plenaĵoj de ĉiuj E-periodaĵoj posedas neniun biblioteko en la mondo. Bibliotekoj posedantaj grandan nombron de E-periodaĵoj estas nur kelkaj. Pro tio la lingvaj kontribuoj en revuoj kaj gazetoj ne estas konataj kaj ne estas utiligeblaj por la nunaj kaj estontaj esperantistoj. Tial estas bone kiam verkoj de iu aŭtoro aperas en aparta libro. Tiam ili fariĝas alireblaj al centoj da legantoj. Tia estas la kazo pri preskaŭ ĉiuj skribaĵoj de Zamenhof. Ili aperis en apartaj libroj dank’al kelkaj entreprenemaj samideanoj kaj eldonejoj: generalo Sebert, d-ro Joh. Ditterle, G. Waringhien kaj

fine la eldonejo Ludovikito. Sub tiu pseŭdonimo kaŝas sin japana s-ano Kanju Ito, kiu iniciatis, redaktis, presis kaj financis „PLENAN VERKARON DE L. L. ZAMENHOF“. Jam aperis dek dikaj, luksaj volumoj de tiu eldonaĵo. Krom ili, Ludovikito — tiu mirinda japano — verkis kaj eldonis: „SENLEGEN-DAN BIOGRAFION DE L. L. ZAMENHOF“. monumentan biografian romanon pri Zamenhof (en japana lingvo), de kiu romano ĝis nun aperis tri dikaj 620-paĝaj volumoj. Kaj nun li pretigas plenan kolekton de la Zamenhofaj tradukoj. Pri Ludovikito oni povas legi en kelkaj numeroj de ESPERANTO: 1968/N-ro 1; 1981/N-ro 12; 1982/N-ro 6.

De la ceteraj aŭtoroj, kies parto de periodaj artikoloj aperis en apartaj broŝuroj aŭ libroj mi povas mencii la jenajn:

— Dr. K. Kalocsay: LA GRAMATIKA KARAKTERO DE LA ESPERANTAJ RADIKOJ

— Petro Stojan: DEVENO KAJ VIVO DE LA LINGVO ESPERANTO

— MONUMENTO DE CARLO BOURLET

— H. A. de Hoog: DU MALSANOJ DE ESPERANTO

— H. A. de Hoog: LA SENPERA VERBIGO DE ADJEKTIVOJ

— Delfi Dalmay: DIALEKTO, DIALEKTIKO

— F. Faulhaber: ESPERANTA MOZAIKO

— Ivo Lapenna: ELEKTITAJ PAROLOJ KAJ PRELEGOJ

— G. Waringhien: ESEJOJ, Volumo I, II, III, IV, V

Al la supra nomaro dum la pasinta jaro UEA eldonis la libron „LINGVA ESENCO DE ESPERANTO“ de Atanas D. Atanasov — ADA, Rotterdam, UEA, 176 p. 21 cm. Pri ĝi la eldonanto skribas:

„Ĉi tio estas la unua ampleksa verko komplete prizorgata de la Grafika Centro de UEA. Jen postmorte la vivoverko de la iama vicprezidanto de la Akademio, elstara esperantologo.

Inter la temoj, kiujn traktas ĉi tiu kolekto de esperantologiaj esejoj troviĝas ankaŭ jenaj:

— Fonetiko; Vortfarado; Prepozicioj

— Sinonimoj kaj homonimoj en Esperanto

— La arto traduki; Propraj nomoj

— La elementoj de Esperanto, ĉu arbitre elpensitaj?

— Onomatopeoj en Esperanto.“

La aŭtoro de la libro dediĉis ĝin al sia libervola sekretario, s-ino R. Konstantinova (antaŭ nelonge forpasinta), talenta verkistino de originalaj prozaĵoj, kiu en daŭro de pli ol 20 jaroj tajpis senesepte ĉiujn skribaĵojn de ADA.

En la antaŭparolo de la libro At. D. Atanasov substrekas la meriton de K. Karucin,

sekretario de BEA, por la pretigo de la manuskripto.

La elekton de la artikoloj por la kolekto faris la aŭtoro mem. Ili aperis en bulgaraj E-revuoj kaj pro tio ne estas konataj al alilandaj esperantistoj. Sendube ĉiuj tuŝitaj demandoj estas kompetente kaj interese pritraktitaj. La libro trovas bonan akcepton ĉe bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj.

Ni senpacience atendas la aperon de „MEMORLIBRO PRI ADA“, kiun libron nun preparas kaj eldonos BEA.

METODI PANĈEV

Tra la leteroj

Karaj geamikoj,

Reveninte hejmen el junpionira tendaro, mi kun panjo kaj mia amikino vizitis ekspozicion de infankreaĵoj „Estu ĉiam la suno, estu ĉiam la paco!“ Tie estis multe da pentraĵoj, desegnaĵoj kaj kreaĵoj de infanoj el multaj landoj, sed la plejmulton da kreaĵoj sendis infanoj el la bulgara urbo Asenovgrad.

Ĉiu kreaĵo estas tre bela, interesa kaj unika. Infanoj pentras Pacon, infanoj volas vivi en paco kaj amikeco. Ili volas ludi, lerni, pentri, sed ne esti karno por la kanonoj. La infanoj ne volas la tragediojn de Vjetnamio kaj Libano, Nord-Irlando kaj Sud-Afriko, ili volas pacon en la tuta mondo.

Kaj ni, infanoj de la planedo Tero, deklaras:

Neniam estu militoj!
Neniam brulegu la Tero!
Neniam sukcesu faŝismo!
Neniam kovru la sunon per atomfungo!

Al mi pleje plaĉis pentraĵo „Samodejki“ de 11-jara knabino el Asenovgrad.

GULKA CARJOVA,

13-jara
lernantino el lernejo „Rihard Zorge“, Rostov-Don, Sovet-Unio

GRAVAJ SCIIGOJ

Ĉi-somere, la 23-29-an de julio, en Veliko Tŕrnovo por la dua fojo okazos Internacia Somera Esperanto-Universitato (ISEU). Ĉu vi partoprenos?!

* * *

La Kurso por Tradukistoj okazos de la 18-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 1984 en Pisanica. Kotizo — 68 levoj, por TART-anoj — 59 levoj, pagendaj al: IEK — 1090 Sofio, p. k. 791, konto 185/3025 DSK — 3.

Rajtas kandidati esperantistoj posedantaj diplomon poŝ III grado kun noto almenaŭ „tre bona“.

Enlanda movado

DUDEK JAROJN BULGARA E-MUZEO

La 14-an de decembro 1983, en la antaŭvespero de la Tago de E-libro, en Sofio oni okazigis celebron de la fondita antaŭ 20 jaroj Bulgara E-Muzeo — unu el la plej grandaj kaj valoraj kolektoj de esperantaĵoj en la mondo.

Raporton pri la pasinta periodofaris Paulina Lazarova, sekretario de la Muzea Sekcio. Ŝi skizis la vivovoĵojn de la fondinto de la Muzeo — d-ro Boris Nedkov. Estis emfazita lia multjara fidela sociutila laboro en la sferoj de kulturo, sanprotektado kaj Esperanto. En 1963, post kontaktoj kun s-ro Hugo Steiner el la Internacia E-Muzeo — Vieno, d-ro Nedkov prenis sur sin la taskon realigi la ideon pri kolektado de E-materialoj. Li estis ankaŭ la unua donacinto — liaj propraj libroj kaj periodaĵoj estis la bazo de la Muzeo. Dum pluraj jaroj ĉiuj materialoj estis konservataj en lia domo.

Post kiam oni finkonstruis la domon de Internacia E-Kursejo en Pisanica, la Muzeo estis translokita tien. En januaro 1982 estis fondita Muzea Sekcio ĉe BEA kaj oni elektis Muzean Konsilantaron. Komenciĝis denove laboro por ordigo de la kolekto kaj koncentrado de la muzea agado en la ĉefurbo.

La nuna stato de la muzea kolekto estas jena: libroj — proksimume 3000, periodaĵoj — ĉirkaŭ 500 titoloj (inkluzive de 400 plenaj, binditaj jarkolektoj), afiŝoj — 100 kaj insignoj — 30. La Muzeo ankaŭ posedas grandan kvanton de glumarkoj, flagetoj, programkajeroj kaj aliaj eksponaĵoj.

Kunĉo Vălev, ĝenerala sekretario de CE de BEA, tralegis gratul-leteron al d-ro Boris Nedkov, fondinto de Bulgara E-Muzeo. Li estas distingita per atesto kaj la Ora Insigno de BEA. En la nomo de la Urba Estraro de BEA — Sofio, la Muzeon salutas ties vicprezidanto Haim Levi kaj donacis skulptitan buston de Zamenhof. Estis tralegita salutletero de DE de BEA — Sumen.

Jam oni metis solidan bazon por prospera disvolvigo de la Bulgara E-Muzeo. Por ĉiam valida restas la tasko de ĉiuj unuopaj bulgaraj esperantistoj kaj organizaĵoj: aktive subteni ĝin kaj donaci esperantaĵojn.

EVGENI GEORGIEV

E-SOCIETO „PROF. ASEN ZLATAROV“ EN ĤASKOVO — 80-JARA

En decembro 1983 E-societo „Prof. Asen Zlatarov“ Ĥaskovo celebris sian 80-jariĝon. Por la solenaĵo venis esperantistoj el la tuta lando, civitanoj el la urbo, ĝelernantoj.

Raporton pri la plej gravaj momentoj el la historio de la societo kaj pri ĝiaj plej elstaraj atingoj faris ĝia prezidanto Nikola Pilev. La societon-jubileulon salutas reprezentanto de la Urba Popola Soveto. En la nomo de CE de BEA la esperantistojn el Ĥaskovo varme salutas la ĝenerala sekretario de BEA Kunĉo Vălev kaj dekoris per la Ora kaj Arĝenta insignoj de BEA veteranojn kaj aktivulojn de la societo. Salutojn prezentis ankaŭ reprezentantoj de kelkaj distriktaj kaj societaj estraroj el la lando. Post la oficiala parto sekvis belarta programo, kiun partoprenis artistoj el Sofio kaj loka E-grupo de ĝelernantoj.

Por la gastoj estis organizita ekskurso tra la urbo. Oni vizitis la Domon de Paskalev el la mezo de la pasinta jarcento, la Domon de Siŝmanov, kiu nun estas muzeo de prilaborado de kotono kaj silko (tre disvastigita en la regiono dum la pasinteco). Kun granda intereso la esperantistoj trarigardis ankaŭ la historian muzeon, kie tre riĉe estas prezentita la fora kaj proksima pasinteco de Ĥaskovo kaj ĝia distrikto, la kontraŭfaŝisma batalo de Ĥaskovanoj, inter kiuj estis ankaŭ esperantistoj, kaj la nuntempa vivo sub la suno de libereco.

K. V.

EL NIA FOTOARKIVO



Unua kongreso de rumanaĵoj esperantistoj en 1909, kiun partoprenis ankaŭ bulgaroj el Batak — Petăr Toŝkov kaj Petăr Fitkin.

ZAMENHOF AJ TAGOJ

LEGADO DE ZAMENHOF AJ VERKOJ

Omaĝe al la 124-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof la 14-an de decembro 1983 en Sofio okazis belarta legado de verkoj de la kreinto de Esperanto. Loko de la aranĝo estis la salono de restaŭrita klubejo de Bulgara Laborista Social-Demokratia Partio (BLSDP). La Sofia Esperantista Kulturcentro „M. Gorkij“ prezentis riĉan programon el originalaj verkoj de Zamenhof kaj muzikaj plenumoj. Ĉeestis geesperantistoj el Sofio, Kjustendil kaj Pernik.

La belarta legado komenciĝis per „Prologo“ de Paul Thorsen, tralegita de Kremona Băceva. Libertaria Mladenova legis mallongigitan paroladon de Zamenhof, faritan en la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne sur Mer (1905). Poste Kunĉo Vălev recitis la ŝatatan de la aŭtoro de Internacia Lingvo poemon „Preĝo sub la verda standardo“.

La versaĵon „Al mia lingvo“ de Julio Baghy deklamis Maria Kirova. La artikolon „Pensiga momento en la poezio de d-ro L. L. Zamenhof“ de Canko Murgin legis Nedka Valjaviĉarska. Petrana Milanova deklamis la versaĵon „Al Zamenhof“ de Asen Grigorov. Mallongigitan paroladon de Zamenhof, faritan en la Tria Universala Kongreso (1907) en Cambridge, tralegis Kunĉo Vălev. Maria Angelova kaj Stefka Kalimenova kantis „Ho, mia kor“ de Zamenhof.

Kordinstrumenta kvarteto „Espero“ sub la gvido de Radoslav Dojĉinov plenumis „Menneton“ de Bokerini, „Mazurkon“ de Vienjaskij kaj „Romancon“ de Sostakoviĉ.

La publiko, tre kontenta, varme aplaudis la plenumantojn, esprimante sian sinceran dankon pro la altnivela belarta programo el Zamenhofaj verkoj. Post la fino de la aranĝo oni trinkis kafon kaj interparolis en amika rondo.

E. G.

ZAMENHOF A VESPERO EN PLEVEN

— Ni povas aserti, ke la membraro de nia E-societo „Eterna Amikeco“ ĉiam pli kaj pli juniĝas — deklaris ties prezidantino d-rino Emilia Kanjovska. — Pruvo pri tio estas la partoprenantoj en la ĉi-vespera solena kunveno omaĝe al la 124-a datreveno de L. L. Zamenhof — plejparte gejunuloj kaj gelernantoj.

Vere, la 15-an de decembro pasintjare, vespere, la salono de la Domo de Instruisto en Pleven estis plenplena de gejunuloj, kiuj kunve-

nis por esprimi sian estimon al la personeco de d-ro L. L. Zamenhof. La solenaĵon ĉeestis gastoj el la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio — Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ kaj Marin Băcev, ĉefa metodikisto de BEA.

En siaj prelegoj ambaŭ reprezentantoj de CE de BEA tuŝis la problemon pri planlingvoj kaj speciale pri Esperanto kiel genia solvo de tiu multjarcenta homa revo.

Parolante pri la personeco de d-ro Zamenhof, Donĉo Ĥitrov emfazis kelkajn gravajn momentojn el lia vivo lige kun la kreo de la Internacia Lingvo kaj speciale lian modelan laboremon kaj diligentecon, lian pacamon kaj humanismon. Marin Băcev rakontis (laŭ sia propra sperto) pri la organizo kaj funkciado de „Junulara Pasporta Servo“, kies membroj havas la eblecon veturadi per Esperanto kaj kontraŭ minimuma pago ricevi loĝejon kaj nutradon fare de la gastigantoj — membroj de JPS en diversaj landoj.

La gejunuloj starigis al la prelegantoj multajn demandojn.

Belartan muzikprogramon plenumis la plej junaj esperantistoj en Pleven — junpioniroj kaj komsomolanoj, kiuj ravis la publikon per siaj emociaj kaj kortuŝaj programeroj.

JORDANKA NIKOLOVA

KORESPOND AJ KURSOJ DE ESPERANTO POR EKSTERLANDANOJ

Unu el la gravaj aktivecoj de la Internacia Esperanto-Kursejo en Sofio estas la organizado de korespondaj kursoj por eksterlandanoj, por lernado de Esperanto.

Tiu ĉi koresponda formo de lernado proponas kelkajn avantaĝojn. Ĝi permesas al la kursanoj lerni la lingvon hejme kaj dum tempo konvena por ili.

La instruado estas trigrada: unua grado — por komencantoj, dua — por progresintoj kaj tria — por perfektigo.

La takso por koresponda kurso por ĉiuj gradoj estas 20 levoj aŭ egalvaloro en la koncerna landa valuto. Ĝi inkluzivas ankaŭ lernolibron por la koncerna grado. Se la kursanoj ne havas eblecon pagi la takson, ili povas rekompenci ĝin per sendado de E-libroj je kosto de 20 levoj.

Post ricevo de la takso, IEK sendas la lernolibrojn al la kursanoj, kiuj siavice trastudas kaj preparas la respektivajn kontrolekzercojn. La lastaj devas esti sendataj al la Kursejo, kie E-lektoroj kontrolas kaj resendas ilin kun la respektivaj notoj.

La takson kaj la kontrolekzercojn oni sendu laŭ nia adreso: Internacia Esperanto-Kursejo, P.K. 791, 1090 Sofio.

NACIAJ, REGIONAJ KAJ INTERNACIAJ ARANĜOJ DUM 1984, DEDIĈITAJ AL LA 40-A DATREVENO DE LA SOCIALISMA REVOLUCIO EN BULGARIO

N-ro	Dato	Loko	Aranĝo	Organizanto
1.	Vintraj ferioj	Sofio	Vintraj feriaj kursoj	Instruista Sekcio ĉe BEA
2.	28—29. I. 84	Kubrat	VARE: „40 jarojn socialisma Bul- gario“	E-societo en Kubrat
3.	28—29. I. 84	Bankja	Renkontiĝo de esperantistoj el la bankuracaj lokoj kaj de turistoj. Vespero „Galanto de Ljulin“	E-societo en urbo Bankja
4.	20—30. III. 84	Pisania	Kurso por junaj tradukistoj	Internacia Esperanto- Kursejo (IEK)
5.	1—2. IV. 84	Plovdiv	XVII Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto	BEJ, DE de BEA en Plovdiv
6.	1—10. IV. 83	Pisania	Kurso por infanoj	IEK
7.	28—29. IV. 84	Loveĉ	Siringa Vespero. Regiona renkonti- ĝo por interŝanĝo de sperto.	DE de BEA, urbo Loveĉ
8.	12—13. V. 84	Ruse	Printempa Amika Renkontiĝo Espe- rantista (PARE)	DE de BEA, Ruse
9.	12—13. V. 84	Trojan	Tradicia Regiona Renkontiĝo por Interŝanĝo de Sperto	E-societo en Trojan
10.	12—18. V. 84	Suna Bordo	Internacia Kongreso de Fervojistoj- Esperantistoj	Fervojista Sekcio ĉe BEA
11.	18—28. V. 84	Velingrad	„Tra kampoj kaj arbaroj“ — Inter- nacia Seminario-Feriado	E-societo en Velingrad
12.	24—27. V. 84	Bankja	Vespero de najtingaloj — E-kantoj	E-societo en Bankja
13.	25—30. V. 84	Sviŝtov	SVIEKO-84	Ekologia Sekcio — Sviŝ- tov
14.	27. V. 84	Sofio	Konferenco de MEM	MEM
15.	26—27. V. 84	Vraca	IV Internacia E-Recitalo-Konkurso de Boteva kaj Revolucia Poezio	CE de BEA, DE de BEA en Vraca
16.	1—14. VI. 84	Pisania	I Internacia Turniro de Esperantis- toj-ŝakistoj	IEK
17.	9—10. VI. 84	Samokov	Renkontiĝo de Esperantistoj el Sud- okcidenta Bulgario	E-societo en Samokov
18.	14—27. VI. 84	Bankja	Festo de la minerala akvo, sano kaj longvivado	E-societo en Bankja
19.	16—17. VI. 84	Velingrad	Scienc-Praktika Konferenco „40 ja- rojn socialisma revolucio en Bulga- rio“	CE de BEA
20.	23—24. VI. 84	Varna	Mara Amika Renkontiĝo Esperanti- sta (MARE)	E-societo „Albatroso“ en Varna

N-ro	Dato	Loko	Arango	Organizanto
21.	23—26. VI. 84	Pisania	Nacia Renkontiĝo de E-lektoroj	Instruista Sekcio ĉe BEA
22.	28. VI.—1.VII. 84	Sofio	Tagoj de la E-Kulturo „Sofio-84“	UE de BEA en Sofio
23.	1—20. VII. 84	Pisania	Esperanto-kursoj	IEK, E-Sekcio ĉe BEA
24.	15—25. VII. 84	Târgoviște	Internacia Festivalo de Esperantistoj-Ŝakistoj, batalantoj por paco „Târgoviște—84“	E-societo en urbo Târgoviște
25.	20—22. VII. 84	Orjaĥovo	II Somera Insula E-Renkontiĝo	E-societo en urbo Orjaĥovo
26.	21—24. VII. 84	Plovdiv	Internacia Junpionira E-Renkontiĝo	Kooperativa Sekcio ĉe BEA
27.	21—30. VII. 84	Pisania	Internacia Junpionira E-Renkontiĝo	IEK
27a.	23—29. VII. 84	V. Târnovo	Internacia Somera E-Universitato	CE de BEA
28.	23—31. VII. 84	Pisania	Kurso por infanoj	IEK
29.	28—29. VII. 84	Bankja	Festo de strato „Esperanto“	E-societo en Bankja
30.	1—20. VIII. 84	Pisania	E-kursoj por instruistoj	IEK
31.	1—21. VIII. 84	Pleven	Internacia Junulara E-Brigado	DE de BEA, Pleven
32.	21—30. VIII. 84	Pisania	Internacia Renkontiĝo de E-ĥoroj	IEK
33.	15—31. VIII.	Borima	Internacia E-Seminario	DE de BEA, Loveĉ
34.	20—26. VIII. 84	Pirin-montaro	Turista tendaro en la loko Sipanica, kun internacia partopreno	E-societoj — urbo Bankja kaj urbo Petriĉ
35.	1—7. IX. 84	Pisania	Internacia Renkontiĝo de Blindaj Esperantistoj	Sekcio de Blindaj Esperantistoj ĉe BEA
36.	1—14. IX. 84	Pisania	Internacia renkontiĝo de ŝatantoj de la ludo „GO“	IEK
37.	26—30. IX. 84	Pisania	Festo de la Kursejo	IEK
38.	29—30. IX. 84	Sliven	III Turista Renkontiĝo „Karandila-84“ kaj renkontiĝo de organizantoj de enlandaj aranĝoj	DE de BEA, Sliven
39.	1—14. X. 84	Pisania	Kurso por junaj tradukistoj	IEK
40.	4—7. X. 84	Pisania	Konciza kurso de ĵurnalistiko	IEK
41.	6—7. X. 84	Kjustendil	Frukta vespero	DE de BEA, Kjustendil
42.	6—7. X. 84	Gorna Orjaĥovica	IV Nacia Konferenco de Fervojistoj-Esperantistoj	E-societo, Gorna Orjaĥovica
43.	6—7. X. 84	Bansko	Recitalo de Vapcarov-poezio	CE de BEA
44.	12—14. X. 84	Petriĉ	Kaŝtana Vesperto	E-societo, Petriĉ

N-ro	Dato	Loko	Aranĝo	Organizanto
45.	12—14. X. 84.	Pisanica	Seminario de distriktaĵ estraroj de BEA	IEK
46.	22—28. X. 84	Pisanica	Seminario de BEJ kun internacia partopreno	BEJ, IEK
47.	1—3. XI. 84	Pisanica	Nacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Poŝtistoj	IEK
48.	3—7. XI. 84	Bankja	Turista seminario pri E-objektoj ligitaj kun la kontraŭfaŝisma batalo	E-societo en urbo Bankja
49.	11—15. XI. 84	Pisanica	Kvalifikaj kursoj de tradukado por sanlaboristoj	IEK
50.	16—18. XI.	Pisanica	Nacia Konferenco de Sanlaboristoj kun internacia partopreno	Medicina Sekcio ĉe BEA
51.	7—9. XII. 84	Pisanica	Studenta Renkontiĝo	BEJ
52.	14—17. XII. 84	Sofio	Zamenhofaj Tagoj	Urba Estraro de BEA, Sofio
53.	29. XII. 84— 2. I. 85	Pisanica	Novjara Internacia Renkontiĝo	IEK

DUSEMAJNAJ KURSOJ EN PISANICA DUM 1984

JANUARO: 3—16 16—29	FEBRUARO: 1—14 15—28
MARTO: 1—14 16—29	APRILIO: 1—14 16—29
MAJO: 3—16 16—30	JUNIO: 1—14 16—29
JULIO: 1—20 21—30	AŬGUSTO: 1—20 21—30
SEPTEMBRO: 1—14 16—29	OKTOBRO: 1—14 16—29
NOVEMBRO: 1—14 16—29	DECEMBRO: 1—14 5—28

RIMARKO: La prezo inkluzivas plenan pensionon: manĝadon tri foje tage, 4—5 lernohorajn matene kaj programon (tri ekskursoj, interkona kaj adiaŭa vespero, prelego kun diapozitivaj pri Bulgario, tuttaga laboro de E-gvidanto kun la grupo).

Ĉe mendo kaj pago ĝis 1. III. 84 por 20-tagaĵ kursoj IEK donas 5%-an rabaton de la prezo.

E-gvidanto atendas la grupojn ĉe stacidomo aŭ flughaveno en Sofio kaj ĉe stacidomo en Plovdiv.

DUSEMAJNAJ KURSOJ EN VARNA DUM 1984

MAJO: 3—16 17—30	SEPTEMBRO: 1—14 16—29
JUNIO: 1—14	OKTOBRO: 1—14 16—29

E-ARANĜOJ LIGITAJ KUN RES- TADO EN PISANICA

I. REVUO DE LA E-POEZIO KAJ KANTO

1—2. IV. 1984 — urbo Plovdiv

3—7. IV. 1984 — Internacia Esperanto-Kursejo — Pisanica

Aliĝadreso: p. k. 66, Bulgara Esperantista Asocio — Sofio

II. RECITALO DE BOTEV-POEZIO KAJ DE REVOLUCIA POEZIO

26—27. V. 1984 — urbo Vraca

1—2. VI. 1984 — Sofio

2—5. VI. 1984 — IEK — Pisanica

Aliĝadreso: p. k. 66 BEA — Sofio

III. SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO

Julio 1984 — 5 tagoj

Ebla 3—4-taga vizito en Pisanica

Aliĝadreso: p. k. 66, BEA — Sofio

IV. RECITALO DE VAPCAROV-POEZIO OKAZE DE LA 75-a DATREVENO DE LIA NASKIĜO

6—7. X. 1984 — Banskó

8—12. X. 1984 — IEK — Pisanica

Aliĝadreso: p. k. 66, BEA — Sofio

Sur la kovrilo: La Nacia Teatro „Ivan Vazov“ — Sofio. Fotografikaĵo de Sami Dekalo.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVSANI,

Dimitar ĤAĜIEV, Krastju KARUCIN.

Administranto — ASEN JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66
1 000 Sofio

80 JAROJN BULGARA NACIA TEATRO

„IVAN VAZOV“



Sceno el la teatraĵo „Ĉagrenita familio“ de Bratislav Nušić, kun la partopreno de K. Kisimov, Kr. Sarafov, P. Ĥranov, V. Andreev kaj L. Zolotoviĉ.

Dum kelkaj jarcentoj la evoluo de la teatro-arto en Bulgario estis bremsata de la fremda jugo — bizanca kaj poste turka. Dum XIX jc. la teatro havas forte substrekitan estetikandedukon kaj kulturen-revolucionan rolon. La teatraj spektakloj estas realigataj de amatoraj aktoroj. Al la publiko oni proponas teatraĵojn de fremdlandaj aŭtoroj — Hebbel, Mollière, Lessing, kaj ankaŭ de bulgaraj — Sava Dobropodni, Dobri Vojnikov, Vasil Drumev.

Post la liberigo de Bulgario elsub la otomana jugo aperas la unuaj profesiaj teatraj trupoj en la lando. En 1888 la teatra trupo „Osnova“ („Fundamento“) komencas prezenti spektaklojn en speciala ligna konstruaĵo en Sofio, kaj en 1892 estas fondita teatro „Sālza i smjāh“ („Ploro kaj Rido“). En 1904 ĝi estiĝas ŝtata teatro kaj estas nomita Nacia Teatro. Post tri jaroj la Nacia Teatro jam havas sian propran konstruaĵon — unu el la plej belaj arkitekturaj monumentoj en nia lando eĉ ĝis nun. Tiam komenciĝas vera florado de la bulgara teatro-arto per verkoj de Ivan Vazov, Petko Todorov, Peju Javorov ka. Sur la scenejo brilas la nomoj de la grandaj bulgaraj aktoroj Vasil Kirkov, Adriana Budevskā, Krāstju Sarafov, Sava Ognjanov, Atanas Kirĉev, Petār Stojĉev, Elena Snejina, Vera Ignatieva. Por stabiligo de la belartaj principoj de la teatro ege kontribuas la rusa aktoro el la Moskva

Belarta Akademia Teatro (MHAT) Nikolaj Masalitinov, kiu dum pluraj jaroj estis ĉefregisoro de la Nacia Teatro kaj kreinto de la bulgara teatra skolo. Dum tiu periodo elkreskas talentaj aktoroj el la sekva generacio: Ivan Dimov, Konstantin Kisimov, Georgi Stamatov, Petja Gerganova, Nikola Ikononov, Olga Kirĉeva, Irina Taseva, Ruĵa Delĉeva — veraj talentuloj, posedantaj teatran kulturon kaj estetikajn principojn.

Direktoro de la Nacia Teatro dum la periodo 1908—1909 estis la elstara poeto Penĉo Slavejkov, kaj aliaj grandaj poetoj kiel Peju Javorov kaj Nikolaj Liliev estis dramaturgoj, belartaj gvidantoj de la teatro. Ilia laboro favore influis sur la evoluon de la teatra sceneja parolo kaj la belartajn kvalitojn de la repertuaro.

El la pli nova aktora generacio tre talentaj estas Andrej Caprazov, Raĉko Jabangiev, Apostol Karamitev, Jordan Matev, Stefan Gecov, Spas Gonev, Mila Pavlova, Ljubomir Kabakĉiev, Tanja Masalitinova, Slavka Slavova, Georgi Kalojanĉev, Georgi Parcalev, Margarita Duparinava, Violeta Baĥĉeva-nova ka.

La regisoroj Stefan Sārĉagiev kaj d-ro Krāstju Mirski posedis valorajn pedagogiajn kvalitojn kaj tre rezultonmetodon de la laboro kun la geaktoroj; kune kun Mois Benies, Filip Filipov, Nikolaj Ljuckanov ili multe kontribuis por kreo de la bulgara socialisma dramaturgio, kies reprezentantoj estas Kamen Zidarov, Georgi Karaslavov, Dimitār Dimov, Orlin Vasilev ka.

La Nacia Teatro „Ivan Vazov“ prezentis ankaŭ en alilando la bulgaran teatroarton, per kio kontribuis por famigo de la bulgara sceneja majstreco.

Dum la forpasintaj 80 jaroj estas trapasita malfacila vojo por konfirmo de ĝusta direkto en la evoluo de la teatraj esprimrimedoj, de vera stilo, de eblecoj por ĝusta interpreto kaj reala rekreo de la dramaturgia materialo.

Ni esperu, ke dum la venontaj jaroj sur la bulgara teatra scenejo lume brilos novaj grandaj nomoj!

RADOŠLAV DOJĈINOV